

KOMENCIĜIS NOVA KURSO ĈE MEL

La 15-an de septembro komenciĝis en Madrido, en la sidejo de MEL, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3-7 de Madrid, ĉeesta baznivela kurso de Esperanto. Ĝi disvolviĝos ĉiujn sabatojn ĝis la fino de la jaro. La instruisto estas Pedro Hernández.

Pliajn informojn petu al la adreso pedro@esperanto.es, aŭ ĉe la fejsbuka adreso <http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid>.

Atentu ke la malnova retlisto “esperantovallekas”, kie eblis sekvi la kursojn kaj havigi al si la materialojn, ekde nun estas “aprende_esperanto_madrid”. La nova adreso de la grupo estas http://es.groups.yahoo.com/group/aprende_esperanto_madrid/, kaj la retadreso: aprende_esperanto_madrid@yahogroups.com.

ESPERANTO EN TEDxMADRID

La unua TED-prelego en Esperanto estis granda sukceso, fakte ĝi finiĝis per granda ovacio kaj daŭre aperadas emociaj kortuŝaj komentoj rete, fare de ĉeestantoj, kiuj ŝategis la prelegon kaj havi la okazon aŭskulti la unuan fojon Esperanton.

Kiel ni antaŭanoncis en pasinta numero, la 15-an de septembro okazis en Madrido serio da konferencoj, laŭ sistemo konata kiel TED. Tiu evento, nomata TEDxMadrid, kaj disvolviĝinta en la kulturcentro Matadero, enhavis prelegon elparolitan en Esperanto.

La preleganto estis David de Ugarte, kiu, ĉirkaŭ la 10:30 horo, ekstaris antaŭ la publiko kaj rakontis al ili en Esperanto, kun subtekstoj en la Hispana, pri la ekuzo de Esperanto fare de lia grupo, la kooperativo “Las Indias”, kio estigis aplaŭdojn en la publiko, kaj pri Esperanto kiel lingva manifestiĝo de libera programaro.

La prelego estos baldaŭ spektebla en la retejo <http://www.tedxmadrid.com/>, sed jam eblas aliri provizoran, malpli kvalitan version, en <http://youtu.be/doNEawgNf0A>.

IAM PRETAS LA ALIĜILO POR LA VENONTA HISPANA KONGRESO

“Frateco”, Aragona Esperanto-Asocio, en kunlaboro kun Hispana Esperanto-Federacio, invitas vin al la partopreno en la 72-a Hispana Kongreso de Esperanto kiu okazos de la 3-a (vendrede) al la 5-a de majo (dimanĉe) de la jaro 2013 en la urbo Zaragozo.

La kongresa devizo estos: “Lingvo kaj sento”. La kongreso havos kiel bazan mot(iv)on la difinon esprimatan de K. Kalocsay por karakterizi nian idiomon: “Lingvo kaj sento. Jen estas Esperanto”. Pri la programo oni ankoraŭ superlaboras.

La baza sidejo de la kongreso estos salono en hotelo (nome: Hotel Goya), kies adreso situas en strato (calle 5 de marzo, 5) je la centro de la urbo (apud: plaza de España kaj avenida Independencia). Oni same disponos je la propra sidejo de la asocio kiu situas en strato proksima.

Kontakto / plia informado ĉe: Aragona Esperanto-Asocio “FRATECO”, calle de la Cadena, 20, 1º izda, 50001 Zaragoza, per retpoŝto ĉe fratecoesperanto@yahoo.es kaj en la retejo de Frateco <http://sites.google.com/site/zaragozafrateco>.

72ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
72º CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO



Lingvo kaj Sento
Lengua y Sentimiento

INTERNACIA SEMAJNO EN OKTOBRO

Kiel ni anoncis en pasintaj numeroj, dum monato oktobro okazos la 20-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Hotelo Best Cambrils, en la urbo Cambrils (Tarragona) de la 6-a ĝis la 13-a de oktobro 2012. Informoj kaj programo en <http://personales.va.com/semajno>.

IRo EN MADRIDO

La Iberia Renkontiĝo, la tutjara kunveno de junuloj en la duoninsulo, estos organizata dum la jaro 2013 de Hispana Esperantista Junulara Societo. Oni ĵus konfirmis ke ĝi okazos en Madrido, en la gastejo (*albergue*) de San Fermín, dum la semajnfino de la 15-16-17 de marto (ampleksebla ĝis la 18-a depende de la laborkalendaro ankoraŭ ne konfirmata). Pri programo kaj aliaj detaloj ni informos en venontaj numeroj.

SAT-KONGRESO EN MADRIDO

Kiel ni informis pasintnumere, la venonta kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazos venontjare en Madrido, konkrete inter la 28-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 2013.

La kongresejo-loĝejo estos la universitata rezidejo Colegio Mayor San Juan Evangelista, kromnomata la "Johnny", fama pro sia riĉa kaj avangarda kultura aktivado. Eblas aliri ĝisdatigitajn informojn per retpaĝo: <http://satesperanto.org/-2013-86-madrido.html>. Tie troviĝas ankaŭ la aliĝilo, plus listo de jam aliĝintaj partoprenantoj.

Eblas kontakti la Organizan Komitaton en la poŝta adreso: Asociación "Izquierda y Esperanto", Apartado de correos 8537, ES – 28080 – Madrid, kaj rete: esperanto@nodo50.org.

PREZENTADO DE LIBRO

La zaragoza esperantisto Beatriz Pitarch prezentis sian libron (hispanlingvan) "Cerrado 24 horas. Crónica de un viaje a Corea del Norte" la jaŭdon 20-an de septembro en Madrid, en la librejo "De Viaje", Serrano, 41.

VIZITIS NIN

La 24an de septembro, venis vizite al la sidejo la kanada samideano kaj bibliotekisto Bruce Crisp. Li pribabilis kun la ĉeestantaj amikoj sian vojaĝplanon, siajn aktivadojn, ĉefe rilate kun bibliotekoj, sian kunlaboron kun la Bitoteko de HEF kaj multajn aliajn interesajn aferojn. La 26-an li vizitis la Nacian Bibliotekon. Fine de la semajno li foriris el Madrido, por daŭrigi sian viziton interalie en Andaluzio kaj Katalunio.

VENONTAJ RENKONTOJ

Se la vetero ne malhelpas, ni renkontiĝos la 6-an de oktobro, sabato, je la 5,30 posttagmeze, en la Kuboplaco (tiu malferma areo komence de strato Princesa, proksime al Placo de Hispanio, kie troviĝas ĝenerale pluraj terasoj), por agrabla babilado kaj praktikado de la lingvo.

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3^o.

Novaĵoj kaj informoj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده/, en retejo <http://www.esperanto.es/mel> aŭ en forumo <http://esperanto.creatuforo.com/>

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4^oB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com